



ELNA-BULTENO

ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 4(70)

Aŭgusto 1970

DEDIĈITA AL LA MEMORO DE DONALD MUNRO

> La Morto de Donald Munro

Sabaton, la 20an de junio, 1970, mortis Donald Munro. Dum malpli ol unu semajno li suferis iaman doloron en la brusto, kaj neniu sciis ke li estis mortota kaŭze de kormalsanatako. Ni ĉiuj funebras kun lia vidvino, Althea, kaj lia filo, Leslie. Dum 20 jaroj li estis elektra enĝeniero en la mina fako de la Bethlehem Steel Corporation, kaj dum multaj de tiuj jaroj li ankaŭ fidele instruis Esperanton. Li fondigis la Lehigh Valley Esperanto Club kaj estis ĝia multjara prezidanto, kaj poste koresponda sekretario. Kiel oficiala delegito de UEA li estis ĉiam preta renkonti vizitantojn al Bethlehem kaj la Lehigh Valley. Li verkis plurajn artikolojn kiuj aperis en la gazetaro. Li naskigis la ideon por ELNA-Bulteno kaj sole havas la respondecon por ĝia bela aspekto. Li firme kredis ke ĉiuj ELNA-anoj devas ricevi, konstante kaj esperante, novaĵon de intereso nur por la esperantistaro, kaj ankaŭ samtempe artikol(et)ojn kun eble plidaŭranta valoro ol tiu de iu ĵurnalo aŭ novaĵletero. Li ja sciis kaj ofte diris ke sen profesiaj redaktoroj, raportistoj, verkistoj, kaj presprovaĵlegantoj, ĉiu numero havos erarojn (fakte okazis); sed, tamen, li estis konvinkita ke tio estus prefere al nenio. Esperu ni ĉiuj ke lia idealo ne velkos, sed kreskos pro pliaj valorplenaj kontribuoj. Ĉe la interigo en Bethlehem oni parolis Esperanton, kaj Rene Oehler kaj Rodney Ring honorigis lian memoron per uzo de la lingvo kiun li amis.

> Klubo Alprenis Novan Nomon

Okaze de pikniko la 19an de julio, 1970, en Egypt, Pa., ĉe domo de D-rino Anna Ziegler, Infannaskiĝkuracistino, la Esperanto Club of the Lehigh Valley unanime decidis alpreni la nomon "Donald Munro Esperanto-Klubo."

> Donaco al ELNA

R.C. Marble, P.O. Box 545, Reseda, Cal. 91335, kiu estas armea kapitano, lernis pri la morto de Donald Munro kaj eksendis monsumon memore al li, kiun li ne konis, al la kasistino de ELNA, S-ino Linker, 1414 Monroe St., Walla Walla, Wash. 99362.

> Poŝta Historio de Esperanto

S-ro Ralph S. Walker verkis bonan artikolon, "Postal History of Esperanto," kiu aperigis en la junio-numero de Scott's Monthly Journal (Vol. 51, No. 4, p. 111.) Kvankam estas bona resumo de la poŝta historio de Esperanto, filatelistoj kaj poŝtmarkkolektantoj povas helpi lin en la plibonigado per leteroj adresitaj al Ralph Walker, 1407 Pathfinder Lane, Mc Lean, Va. 22101.

> Nova Ŝtata Organizo

Pro la iniciativo de EKCO (Esperanto-Klubo de Centra Ohio) oni aranĝis ŝtatan kongreson, dimanĉon, la 28an de junio, en Columbus, Ohio, por starigi daŭran ŝtatan organizon. Decidiĝis unanime ke la nomo estu EKO (Esperanto-Klubo de Ohio), kaj oni elektis oficistaron jene: Lewis Cook, prez.; Ronald Burris, vic-prez.; Diane Kasler, sek.; Eleanor Mc Grogan, kasistino; kaj Kathleen Wood, estrino pri publikaj rilatoj.

ELNA-BULTENO

REDAKTOROJ: Donald Munro
Rodney Ring

ELNA-Bulteno
ADRESO: Muhlenberg College
Allentown, Pa. 18104

> ELNA-Kongreso en San Francisco, 22-26 Julio, 1970

Dum la 18a nacia kongreso de ELNA ĉe San Francisco State College, oni trovis la tempon, inter la multaj aferoj (vidu "oficialaĵojn"), a) speciale agnoski Peggy Linker, Adrian Hughes, Doris Prenner, Jerry Brody, kaj Helen Starr; b) sendi profundan simpatian al la familio de Donald Munro; kaj c) dediĉi solenan momenton al la mortintoj, nome George Falgier, S-ino Erna Sindhwad, eks-senatano Harley E. Dillinger, Donald Munro, Barbara Aleshire, Ruth Daniel, F-ino Toni Simon, kaj Lee Clarke.

Ankaŭ, per unanime akceptitaj proponoj, oni a) kore dankis D-ron Balcar pro lia kompetenta sindonema servado ĉe la oficialaj arkivoj ĉe Monterey, kaj petis ĉiun anon kaj klubon pli intense kaj amplekse kunlaboru per regula sendado de dokumentoj, revuoj, bildoj, kaj aliaj memorindaĵoj al li; b) urĝis la klubojn kaj anojn kontakti MENSA-anojn en iliaj urboj por rekruti la inteligentulojn al la movado.

> La Movado en Arizona

La Esperanto-Klubo de Fenikso, fondita per la laboro de Teddy Hagner, kies prezidanto estas Dick Culwell kaj sekretariino estas S-ino E. Feld, havis televidan intervjuon ĵaŭdon, la 18an de junio (KPHO-TV, #5).

Nova Direktoro Por Skoltoj

La Skolta Esperantista Ligo anoncis ke la membrecdirektoro de la "Green Star Scout Clubs" estas H. Wm. Beare, Jr., 1007 Chicago Blvd., San Antonio, Texas 78210.

Elstara Esperanta Studkurso

La Junularo (JEN) ĵus komencis novan altnivelan studgrupplanon. Ĝi nomiĝas "Supera Esperanta Koresponda Seminario," kaj prezentas la okazon por akiri veran superregadon de Esperanto. Aŭ JEN aŭ la "International Language Society" (University of Chicago, 1212 East 59th St., Chicago, Ill. 60637) poŝtsendos belan broŝuron al informpetintoj.

Trovu Novan Plezuron en Legado

Ekzistas multaj publikaĵoj kiujn vi eble ne konas. Se vi volos vidi ekzempleron de Esperanto-Gazeto de la Instituto por la Oficialigo de Esperanto, sendu adresumitan longan koverton afrankitan al Conrad Fisher, Rt. 1, Meadville, Pa. 16335.

Prezidanta Adreso

La daŭra adreso de Francis Helmuth, prezidanto de ELNA, Landa Asocio aliĝinta al UEA, estas 5526 Beaumont Ave., La Jolla, Cal. 92037.

ELNA-Bulteno Travivos

Kun la helpo de D-ro Alexis Ostapenko, profesoro ĉe Lehigh University, Bethlehem, Pa., kaj la bonvena konsilo de aliaj esperantistoj, ni penos eldoni la Bultenon por ELNA malgraŭ la morto de nia ĉefredaktoro, Donald Munro.

* * * * *

La plej malnova universitato en Usono estas Harvard, kiu fondiĝis en 1636, nur 16 jarojn post la pilgrimoj elŝipiĝis kaj surteriĝis ĉe Plymouth.

NI KORESPONDU

Politika ekonomisto havas intereson en socialaj problemoj kaj lingvaj studoj en Usono, kaj volas havi amikojn en nia lando. Karl Joachim Thomam, Heinrich Mann Strasse 16, GDR 27 Schwemklekl, Germany.

25-jara studentino kiu ĵus lernis Esperanton deziras korespondi "pri ĉiuj temoj" kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun geesperantistoj en Usono. Sandra da Rocha Monteiro, Rua do Resende 99, Apt. 802, ZC-06 Rio de Janeiro, Guanabara, Brasil.

16-jara lernantino de Ekonomia Liceo en Lukowa kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn kaj serĉas amikojn en Usono en la sama aĝnivele. Gertruda Okon, Zukowo-le, pow. Kartuzy, Poland.

Personoj el ĉiuj landoj atendas vin, se vi simple postulu la helpon de "Esperanto Desk, People to People International," 2201 Grand Ave., Kansas City, Mo. 64108.

Membroj de japana Esperanto-Klubo en Kawagoe Knabina Altlernejo serĉas informon pri la Esperanto movado inter lernejoj gestudentoj en Usono por enmeti en publika raporto okaze de "lerneja festo." Ili volas scii ĉu usonaj gejunuloj fondas organizojn, ĉu oni faras amuzaĵon post la lernado, kaj kiamaniere oni lernas, t.e., per kio metodo? Skribu al la Ĉefmembro, Sizue Odaka, Roken-Coo 1-23, (350) Kawagoe, Saitama-ken, Japan.

ARTIKOLOJ

KAMELO AŬ ŜNURIGO

de Pavlos Giannelias

En "Nuntempa Bulgario" mi legis diskutadon pri la plej bona vorto de la esprimo "trueto de kudrilo." Tie estas citita la tre konata frazo de la evangelio: "estas pli facile por kamelo iri tra trueto de kudrilo ol por riĉulo eniri en la regnon de dio."

Tiu ĉi frazo havas ankaŭ tre grandan intereson kiel lingvo-scienca problemo, speciale rilate al la diversaj tradukoj, kiujn kaŭzis la fervore disputata elparolo de la malnovgreka litero "H." La klasikaj helenoj prononcis ĝin kiel "E", kaj ĝia nomo estas laŭ Erasmo "eta." Sed post la epoko de aleksandro ĝis nun ĝi estas elparolata simile al la litero "I" (jota). Tion pruvas certe ankaŭ la cirila litero "и", kies formon Cirilo pruntis de la malgranda "eta" (и) kaj kiun uzas rusoj, bulgaraj, k.a., ekskluzive por la vokalo "i."

Tiel okazis ke en iuj el la plej antikvaj manuskriptoj de la evangelioj la vorto "kamelos" estas skribita per jota anstataŭ eta. Tio ŝanĝas tute la sencon, ĉar "kamilos" signifas dikegan ŝnuron de la ŝipistoj kaj fiŝistoj. Verŝajne tio estis la vera senco de la paroloj de Kristo pri la objekto, kio tiom malfacile trairus la trueton de kudrilo. Sed bedaŭrinde la latinlingva traduko uzis la helenan tekston, kie kamelo estas skribita per "eta," kaj sekve la pli komprenebla ideo pri dikega ŝnuro estis forpuŝita trograndigita per la besto "kamelo," kiu absolute ne povas trapasi kudriltrueton. Tiu ĉi eraro pasis de la latina teksto en ĉiujn tradukojn de la aliaj lingvoj en la tuta mondo. (S-ro Giannelias venas de Lyon, Francujo; kaj ĉi tiu estis en "Tra la Leteroj" en la bonekonata gazeto Nuntempa Bulgario, 1961 #9.)

DUM FRUA MARŜADO

Suntramontatendo
Frumatenreveno
Purĝojkanteliro
Replenfeliĉigo !

PRI VERDSTELA LINGVO

Ĉielverdstelsigno
Batalmondespero
Malĝojterdonaco
Facilinterlingvo !

KAMPARA RAKONTO

Multaj personoj ne scias ke la insektoj de la urbo ĉiel ~~diferencas~~ de la insektoj de la kamparo. Eĉ nun, tamen, mi hezitas skribi ion pri la kamparinsektoj kiujn mi mem rigardis ĉe mia kampara domo, pro la timo ke la legantoj de la urbo ne kredos min. Sed geesperantistoj devas scii ke la vereco estas pli stranga ol fikcio, kaj mi do rakontos al vi kelkajn elektitajn faktojn.

Urbinesektoj havas nur tri partojn: kapon, torakon, kaj ventron; sed kamparaj insektoj posedas ankaŭ alian parton uzatan kiel ŝarĝujo. Kelkaj havas diversajn ilojn kiujn ili portas en la ujo. Por ekzemplo, kelkaj portas segilojn por liberigi sin de la teruraj insektmanĝantaj plantoj. Tion hazarde mi vidis iun tagon.

Mi havas insektmanĝantan planton kiu havas grandajn foliojn, kaj la duono de ĉiu estas movebla laŭ ripo kun vico de dentoj. La folioj havas sentemajn harojn kaj liniĝas de digestigaj glandoj. Kiam muŝoj tuŝas la harojn, kiuj estas tre delikataj, la plataĵoj de la folioj fermas kaj la vicoj de dentoj interkroĉiĝas, kaptante la muŝojn. Tiam la glandoj sekrecias digestigan sukron sur la muŝojn por sorbi la produktaĵojn de putreco. Mi rigardis iun tagon ke la planto logis la insektojn per helaj koloroj kaj nektaro kaj kaptis multajn muŝojn. Kiam ili atingis la foliojn, la insektoj glitis malsupren sur glitema surfaco kaj estis kaptitaj. Mi rigardis ke unu prenis de malantaŭ sia ventro, el la t.n. ŝarĝujo, segilon. Li tiam tranĉis trueton inter la dentvicoj tra la folio en mola, delikata parto. Ekstere, li reenmetis la segilon en la poŝon (aŭ ujon).

Mi ja ne estas entomologo, sed mi lernis ke estas saĝe studi insektojn. Mia najbaro diris al mi ke li neniam mortigis insektojn, ĉar ĉiuj estas utilaj. Li klarigis al mi la ideon, kaj eksplikis ke ili faras silkon, mielon, kaj aliajn produktaĵojn; kaj li rememorigis min ke ili fekundigas la florojn. Okazis ke iu grandega amaso de malgrandaj insektoj detruis lian fruktarbejon, kaj li fariĝis mizera. Li ne pensis ke ili povis esti minaco, ĉar ili estis tiel malgrandaj, sed dum nur unu nokto ili detruis grandajn fortajn pomarbojn, kiuj diskuniĝis kaj restis kiel cindropolvaj montetoj!

Tamen, la plej mirindaj estas la grandaj insektoj. Ekzistas en mia ĉirkaŭaĵo kelkaj gigantaj insektoj. Kiam ili pligrandiĝas ili ĉiam ŝajnas fariĝi malpli viglaj, kaj ofte dum semajnoj nur staras senmove. Unu tagon mi laŭkutime alligis la hamakon (tiu estas lito kiun oni pendigas inter du arbojn) en la ombro de la arbaro apud la domo. Mi longtempe kuŝis tie kaj legis libron, sed la arboj ekmovis! Mi tiam elkomprenis ke la du arboj estis vere la kruroj de giganta insekto kun ses flugiloj! Feliĉe mi ne estis vundita kiam mi falis je la komenco de la flugo!

Mia najbaro vidis la aferon kaj pafis la flugantan monstron, sed la korpo falis en lagon. Ni ne povis eltiri la kadavron, tamen, ĉar la hamako servis kiel velo sur boato, kaj la kruroj sin etendis kiel la mastoj de velŝipo. La vento blovis kaj ĝi velveturis plurfoje ĉirkaŭ la lago ĝis ĝi subakviĝis!

Mirinde, kiam ĝi subeniris en la akvo la hamako servis tiam kiel reto, kaj kaptis fiŝojn! Ni poste trovis ĝin kaj ĝuis memorindan manĝon!

POR STUDANTOJ

ANTISEPSILO

La substanco kiu haltigas la kreskadon de bakterioj, aŭ de aliaj mikro-organismoj kiuj kaŭzas malsanon, nomiĝas antisepsilo. Oni uzas la vorton "desinfektilo" nuntempe signifi la saman, sed antaŭe la du vortoj signifis du diversajn substancojn. Antisepsilo nur haltigis la kreskadon de mikroboj, dum desinfektiloj detruis ilin. Hodiaŭ tamen, la vorto "antisepsilo" kutime signifas la substancan kiu batalas la mikrobojn kiuj loĝas en la vivanta histo, sed "desinfektilo" signifas la substancan kiun oni uzas mortigi ilin en la aero, aŭ sur objektoj en malsanejoj, domoj, lernejoj, fabrikejoj, aŭ iu ajn loko alia.

Por esti efika la antisepsilo devas havi sufiĉan forton por mortigi la mikrobojn aŭ malakceli la kreskadon aŭ nombron. Sed, kiam estas tro forta, ĝi ankaŭ detruas la histojn de la korpo. Ekzistas antisepsiloj kiuj ne nur difektigas malutilajn mikrobojn, sed kiuj ankaŭ kaŭzas dolorigajn ulcerojn kaj erupciojn de la haŭto de kelkaj personoj, tiuj kun impresiĝema haŭto.

Ŝajnas ke la unua persono kiu rekomendis la uzadon de antisepsiloj estis d-ro Ignaz Semmelweis (1818 - 1865), hungara infan-naskiĝkuracisto. Li kredis ke la "ioj" kiuj kaŭzis t.n. infanlit-febron estis portitaj al la patrinoj sur la manoj kaj instrumentoj de la kuracistoj, flegistinoj, servistoj, kaj eĉ vizitantoj. En la jaro 1847 li advizis ke ĉiuj kuracistoj purigu la manojn kaj ilojn per mikslivajo de klor-kalko. Kvankam tiu ego malgrandigis la tiaman mortadon de infanlitfebro, oni malofte faris ĝin, kaj baldaŭ ili tute forgesis la ideon.

Nur poste, en la jaro 1867, venis la nova epoko, kiam d-ro Josefo Lister (1827 - 1912), angla ĥirurgo kaj medicina profesoro, iniciatis karbolan acidon kiel antisepsilo por antaŭmalebligi la infekton dum ĥirurgaj operacioj.

Frue en sia kariero d-ro Lister studis gangrenon kaj la t.n. venen-sangon. Oni diris ke li jam publikigis la "klasikan libron" de la jarcento pri la fenomeno de inflamo. Li sciigis ke d-ro Louis Pasteur firme montris la fakton ke mikro-organismoj estas kutime portataj tra la aero, kaj li do eltrovis la mikrobmortiganton (de karbola acido) por almeti sur bandaĝojn, instrumentojn, ĥirurgmanojn, kaj viktimkorpojn.

La mortado kaŭze de ĥirurgaj operacioj post la uzado de ĉi tiu antisepsilo de d-ro Lister mirinde malaltiĝis de 90% ĝis 15%!! Oni surŝprucigis ĉion ĉie. Oni komencis kutime aspergi la laborejon dum la operacioj kaj ankaŭ la vundojn mem. Ili sukcese batalis infekton.

Multaj novaj antisepsiloj nun ekzistas, kaj hodiaŭ ni havas la miraklo-drogojn, sed la nomo de bonekonita "gargaraĵo" (Listerine) devas rememorigi nin pri la laboro de d-ro Josefo Lister kaj la historio de antisepsilo.

* * * * *

La tajlorbirdo estas kantbirdo kiu troviĝas en Ĉinujo, Hindujo, Malajlando, kaj la Filipinoj. Ĝi ricevis tian nomon pro sia maniero de konstrui nestojn.

Uzante sian bekon kiel kudrilo, ĝi kunigas la randojn de granda faldita arbfolio per pecoj de silka aŭ lana fadeno, aŭ per strioj de leguma fibro. Tiam, en la folio, ĝi konstruas neston el planta lanugo, fajna herbo, kaj haroj.

OFICIALAĴOJ

ELNA-Estraro, 1970-1971: Direktoroj: Allan Boschen (ĝis 1971) 195 Partridge Rd., Pittsfield, Mass. 01201; Armin Doneis (ĝis 1971) Box 105, Pharr, Texas 78577; Leslie Green (ĝis 1971) Box 4162, Covina, Cal. 91722; Jonathan Pool (ĝis 1972) 5238 S. Kenwood, Apt.1, Chicago, Ill. 60615; Margot Gerson (ĝis 1972) 29 Windsor Rd., Great Neck, N.Y. 11021; David B. Richardson (ĝis 1972) Box 81, Eastsound, Wash. 98245; William H. Schulze (ĝis 1973) 410 Darrell Rd., Hillsborough, Cal. 94010; Dorothy Holland (ĝis 1973) 1010 Crestwood Pl., Santa Barbara, Cal. 93105; James Deer (ĝis 1973) 12946 NE Hancock St., Portland, Ore. 97230.
Oficistoj: Francis E. Helmuth, Prezidanto (ĝis 1972) 5526 Beaumont Ave., La Jolla, Cal. 92037; Mark Starr, Vicprezidanto (ĝis 1972) 3940 47th St., Long Island City, N.Y. 11104; Conrad Fisher, Sekretario (ĝis 1971) RFD 1, Meadville, Pa. 16335; Peggy Linker, Kasistino (ĝis 1973) 1414 Monroe, Walla Walla, Wash. 99362.

Komitatoj nomitaj de la prezidanto: Kandidata Komitato: John Lewine, Ken Thomson, Roy Holland, Bill Glenny, S-ino Peterson; Financa Komitato: Bob Bailey kaj Gigi Harabagiu; Informilo-Komitato: Eric Felker kaj Bill Glenny; Komitato Pri Paĝindikilo: William Harmon kaj Martha Walker; Komitato Pri CED-Dokumentoj: Gary Mickle.

Dumkongresaj Komitatoj: Balota Komitato: D-ro B.J. Balcar, S-ino G. Chomette, Bonnie Helmuth; Financa Komitato: Bob Bailey kaj Bob Runser; Raporta Komitato: Ken Ver Ploeg, John Lewine, Ken Thomson, William Schulze, Rezolucia kaj Propona Komitato: Al Estling, Mark Starr, Armin Doneis, kaj William Glenny.

Salutoj de Fakaj Organizoj: Dorothy Holland (Asocio de Amerikaj Instruistoj), Armin Doneis (Ĉef-Delégito de UEA), Mark Starr (Inform-centro, N.Y.), Cathy Schulze (Inform-centro Okcidenta).

Individuaj Salutoj al kongreso: F-ino Reiko Yano, Hamamatsu, Japanujo; S-ro Byron Eguiguren, Ekvadoro (nuntempe Ill.); Doug Pulleyblank, Kanado; Gary Mickle, SPERO; Campbell Nelson, Sud-Kalifornia Esperanto-Instituto; S-ino Flak, Nederlando; John Fulton, San Gabriel Valo; Martha Walker, Napa; Ken Thomson, Texas; Elson Snow, San Francisco; Ida Belle Craig, Sacramento; Louis Stein, San Diego; Celia Winnick, Los Angeles; Dorothy Jones, Portland; Armin Doneis (kiu legis inviton de la San Antonio-klubo por la 19a kongreso); Ken Ver Ploeg, Spokane; Al Estling, Walla Walla; John Lewine, Nov-jorko kaj Berkŝira Esperanto-Societo; Ralph Wagner, New Jersey; Duncan Charters, Indiana; Ray Menaker, Alasko; Thomas Ludwig, Kentucky; Elfrieda Walters, Chicago; Dorothy Lee, Redlands; Kay Wood, Ohio; Bob Williams, Stockton.

* * * * *

Post la pluvo, ni diras ke ni vidas "Ĉielarkon." Sed ĉi tiu fenomeno havas diversajn nomojn ĉirkaŭ la mondo. En Italujo estas "ekbrilanta arko." En la sanskrita lingvo oni diras "paf-arko de Indra." La popoloj de Annan nomas ĝin "la fenestreto en la ĉielo." Nordafrikanoj nomas ĝin "la edziĝontino de la pluvo." Kaj en mez-eŭropo estas "ponto de la sankta spirito," aŭ "krono de sankta Bernardo," aŭ "la zono de dio." La nomo ne gravas; estas bela.